

Annette von Droste-Hülshoff,

Ĉe l' turo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Mi staras sur alta balkono de tur',
 Ekstere en ŝtorma bruado,
 Lasante tra mia hararo nur
 La venton samkiel menado:
 Ho, vi sovaĝulo freneza, mi
 Ja ĉirkaŭprenemas vin forte,
 Mi lukte emas batali kun vi
 Je vivo nun aŭ je-morte!

La ondojn mi vidas malsupre jen
 Samkiel ĉashundojn ludantajn,
 Akverojn mi vidas tie en
 Aeron brilante saltantajn.
 Ho, salti mi emas en tiun ĉi
 Malsekan furiozularon,
 Por ĉasi volus enplonĝi mi
 En la koralan arbaron!

Ŝipflagon mi vidas de tie ĉi,
 surmaste turniĝantan,
 La ŝipon tie observas mi
 Suronde jen turniĝantan.
 Ho, sidi mi emus volonte sur
 La ŝip', ekpreni la stirradon,
 Kaj super la rif' en rapida kur'
 Superi de l' maro surfadon.

...

Se estus mi ĉasisto ja.
Nur pec' de soldato ia,
Se estus mi viro almenaŭ, la
Ĉiel' vere estus eĉ mia.
Mi bonkondata infan' tie ĉi
Nun sidas sekrete revante,
Hararon mian malligas mi
Envente ĝin flirti lasante!

*Traduko de la Germana poemo "Am Turme" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2006-06.*

MR-448-1 / Arg-543-1090 (2013-01-31 16:21:43)